

## & La enamiĝinta leono:

< Rekante 11 el 23 batoj por strofo, entute 253 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:23> (a;Mi /LaLa TiTi dore mido Ti Ti;Mi rere TiTi dodo LaSi Ti Ti;

(#Rekantaĵe: La Ti dore mido Ti; rere TiTi doododo LaSi La)

)×11 )+

### (&Strofoj:

'1 Kna/binon amis la leon' freneze, ; sin svatis ĉe la patro. Lin kompleze

(×:; **Enamiĝis la leon' ; provis esti milda por ŝia bon'.**)

'2 akceptis tiu, sen plej eta ŝajno ; de rifuzem', kaj diris: "Granda gajno .....

'3 estus por ĉiu havi vin parenco, ; min plezurigas via nupt-intenco. ....

'4 Mi donas ŝin al vi kun ĝoja preto, ; sendube ... jes ... sed mia filineto .....

'5 estas knabin' de delikataj sentoj ... ; timema ... nu ... kaj viaj ungoj, dentoj!

.....

'6 Ne miru, ke ŝi tremas de vi. Sveno ; ŝin kaptus ja ĉe via ĉirkaŭpreno. ....

'7 Mi petas do, se vi ŝin amas vere, ; svatiĝi venu pli mildmaniere." .....

'9 Tuj la leon' amarda hejmeniris, ; la ungojn tondis, dentojn li eltiris, .....

'10 kaj rerapidis al la dom' bopatra. ; Sed tie — stango, pugno, ŝtono akra .....

'11 atendis la senarman, kaj lin frapis, ; ĝis, duonmorta, pene li eskapis. ....)